


# PONTO☆

Jaro 5 N-ro 4 (29) Organo de Sunda Esperanto Agado oktobro 2006

## Sea-kunveno la 21-an de oktobro en Helsingborgo

Ne forgesu aliĝi al Ann-Louise Åkerlund, tel. 042-291262 aŭ 042-186639 (oficejo)
La tagordo vi trovas sur paĝo 1 en Ponto n-ro 3.

**Svenska Esperanto-Förbundet på Skolforum**,
som är Nordens största mötesplats för kompetensutveckling.
Här finns nyheter för alla som arbetar inom skola och förskola.
Skolforum erbjuder ett brett seminarieprogram och en heltäckande utställning med över 200 utställare.
Ta tillfället i akt och bidra till information om esperanto!




## Esperanto i dag

**SEF**
informerar om esperanto på sin hemsida www.esperanto.se

**Esperanto i Sverige**

Det finns en kalender (http://my.calendars.net/esperanto.se) för alla esperanto-arrangemang i Sverige

**Årets esperanto-barnbok!**
Universala Esperanto-Asocio har utsett Leif Nordenstorms bok ”Arne la ĉefido” till 2005-års barnbok

**Esperanto i universitet**
Från och med utbildningsåret 2006-2007 på Instutitionen för Interlingvistik och Esperanto vid Universitetet i Amsterdam kommer man också att erbjuda utbildning i Esperanto

**Världsesperantokongresser**
Varje år hålls en världskongress, drygt 2000 personer från ett 60-tal länder brukar delta. I år var den i Florens och nästa år, 2007, kommer den att vara i Yokohama, Japan. 2008 års världskongress kommer att hållas i Rotterdam.

**Akademio de Esperanto**
En akademi bestående av ett 50-tal skickliga esperantister från olika länder har det yttersta ansvaret för språket och dess utveckling. Akademin ger ut en tidskrift med råd, beslut och intressanta språkfrågor. En av delegatena är Bertil Wennergren från Sverige (www.akademio-de-esperanto.org).

Utdrag ur ”Esperanto idag”

Nästa **Ponto**, nr 5
utkommer ca 16/12
Skicka allt material till *Karin Lindquist*
**senast den 1/12**

*Sunda Esperanto Agado*
Reto de la Esperanta kunlaboro en la Sunda regiono

Redaktionskommitté/*redakta komitato:*
**Kontaktperson**: *Karin Lindquist* *karin@agado.net*
Sergels väg 14A, SE-217 57 Malmö +46 40 98 01 20

Övriga/kromaj anoj: Sten Svenonius (paĝaranĝo), Johan Svenonius (tekniko), Per-Olov Johansson (presado)



ISSN 0907-127X

# La Folio

Klubo Esperantista de Malmö

*Jaro 77 N-ro 4 (698)* **>>ĉiam antaŭen<<**

Fondita en 1906


Nia antaŭa membro ALVAR STENBERG tre aktiva en Radio Esperanto, forpasis.



## EL LA KLUBA VIVO

**Ordinara kunsido 6.9**
La prezidanto Sten Svenonius informis pri la aŭtunaj kursoj. Konversacia kurso startos 18.9 je 14-15.30 h kun Per-Olov Johansson kiel respondeculo. Kurso por komencantoj espereble povos okazi kunlabore kun SEA. Estas decidite ke la estraro provus listigi ĉiujn metodojn por ekstudi esperanton.
Pri la aŭtunaj programeroj vi povas legi sur paĝo 5

**Jenaj elektoj okazis:**
Aŭtuna festo 14.10: Elsy Lindblom-Vel kunvokanto, Albert Vel, Ulla Ullfors, Alf Mobark
Aŭkcio 19.11: Gerd Rodén kunvokanto, Agneta kaj Gertrud Lund, Alf Mobark, Karin Rylander kaj Sten Svenonius.

Kafkomitatoj: 6.9 Karin Rylander, 20.9 Gertrud Lund, 4.10 Asta Schaedel, 25.10 Per-Olov Johansson, 8.11 Karin Lindquist, 6.12 Elsy Lindblom-Vel kaj Albert Vel.
Estis decidite ke la membrokotizoj por 2007 restu:

**Kluba membreco**

| | |
|---|---|
| Membro de KEM | 150 kronoj |
| Junulo ĝis 20 jaroj | 60 kronoj |
| Familio | 200 kronoj |

**Membreco ankaŭ en SEF**

| | |
|---|---|
| Membro de KEM/SEF | 310 kronoj (160 por SEF) |
| Junulo ĝis 20 jaroj | 140 kronoj (80 por SEF) |
| Familio | 440 kronoj (240 por SEF) |


Malmö Esperantoförening
*Kronetorpsg 94, SE - 212 27 MALMÖ*
☏ 040-18 71 90
Poŝtĝiro: 3 87 14 - 2
Prezidanto:
*Sten Svenonius sten@agado.net*
☏ 040-19 14 77


La klubo plusendos al SEF la koston deciditan de ĝi. La abonprezo por Ponto estu 70 kronoj por 2007.

Estis laŭtlegitaj saluto de Ulla Luin por la kongreso en Malmö kaj respondo de Ilmar Reepalu al Leon Salomonsson samteme.

**La prezidanto informis ke**
1. estas propono pri insigno por SEA kiun la kunsido aprobis, kaj kiu estas proponota al la venonta SEA-kunsido.
1. la tuta informado en la fenestroj de la klubejo estos renovigita
1. ĉiuj interesitoj pri esperanto estu notitaj en nova dosiero en la klubejo mem, ordosiero pri la100-jara kongreso estu pretigita kaj ĉiuj membroj petitaj kunporti fotojn kaj aliajn dokumentojn al la kunveno la 20.9.

Post la kunsido Bernt Lindquist kaj Alf Mobark montris fotojn pri la 100-jara jubileo.

**Someraj memoroj 20.9**
Ankoraŭ la suno brilis kiam ni renkontiĝis por paroli pri la somero.
Per-Olov enkondukis rakontante pri ekskursoj al artaj vidindaĵoj en Kopenhago, Kvidinge, Ystad kaj Borstahusen, post kio Asta memoris sian boatan vojaĝon al Kymmendö en la arkipelago de Stokholmo kaj konata pere de August Strindberg. Vizitante Germanion Gertrud i a veturis al Lutzen kie Gustav II Adolf mortfalis en la jaro 1632.

**Pri la UEA-kongreso 4.10**
En bonega esperanto Urszula Kwasniewska parolis pri siaj impresoj kaj de la urbo Florenco kaj de la UEA-kongreso tie. La urbo estas riĉa je kulturo kaj beleco, kaj la kongreso superfluis de programeroj. Urszula partoprenis en kiel eble plej multaj tiaj, kelkfoje ŝi dividis sian tempon provante aŭskulti du prelegojn samtempe!
Ulla Ullfors montris bildojn de Florenco kaj la kongreso, kaj Urszula aŭskultigis al ni kantojn de juna Carina. entute estis bonordigita sed varmega kongreso.

Gertrud Lund

# Kontaktilo

*Membrogazeto de K.E.K*
*Konversacia Esperantista Klubo*
*Kopenhago*
**N-ro 4 (668) 2006 70a-jaro**



Karaj legantoj

Krom ***kursoj*** en la ĉiulunda kunvenejo estos ankaŭ kurso por komencantoj dum ĵaŭdoj:
**Den Classenske Legatskole, Vester Voldgade 98:**
Kursoj ĉiuĵaŭde (escepte de lernejaj ferioj) ekde h 18.45.
Kontaktulo: Kim J Henriksen, tel 32 54 93 54, retadreso kek@esperanto.dk

- kaj jen pri nia nova kunvenejo, kiu estas eĉ pli taŭga ol la antaŭa loko:
**Kalvebod Brygge 32. Aŭtomobiloj uzu la ramplon kaj trovos tre taŭgan parkeblecon, piedirantoj uzu ŝtuparon 'trappetårn 32'.**
Eblas mendi buterpanojn (ankaŭ vegetarajn) ĉiulunde. La prezo estas po 12 kr. Se iu volas manĝi en la klubejo, mendu la deziratan nombron da buterpanoj ĉe Karen plej malfrue ĵaŭde – tel. 55 72 73 77, aŭ retpoŝte
eho-esperanto@stofanet.dk

Biero kaj sodakvo ĉiam aĉeteblas, sed se oni deziras ruĝan vinon, oni mendu aparte (vidu supre). Prezo por unu botelo estas 70 kr.

**Tempoj**
18.15 – 18.45 komuna manĝo
18.45 – 20.15 kursoj, legogrupo
19.30 – 20.15 studgrupo aŭ programo

20.15 – 20.45 paŭzo – kafo, teo
20.45 – 21.30 studgrupo aŭ programo


**Pri la lingvofestivalo**
Kunlabore kun studentoj de KUA kaj Verdensklubben ni sukcesis festi multlingvece, celante ke lingvoj konu unu la aliajn, instigis ke multaj lernis pri la kulturoj kaj lingvoj de aliaj. Ĉirkaŭ 25 lingvoj sin prezentis diversmaniere. En bazaro ĉiu havis sian budon kaj laŭvice buŝe prezentis sian lingvon en ĉambro dum 25 minutoj. Line Burholt Kristensen sperte aranĝis la invitleterojn kaj la listojn. Unue ŝi prizorgis la lokon por ni. - Multaj klubanoj venis kun kukoj, ŝoforo sin ofertis, kaj multaj aliaj helpis.

Ni planas ripeti. Jam ni havas la hejmpaĝon:
www.sprogfestival.dk
Dum la semajno antaŭe ni agis dum la **Internacia Tago,** kiun aranĝis *Kopenhaga Komunumo*, kune kun diversaj etnaj grupoj celante helpi al la integriĝo. Multaj helpantoj disdonis niajn kampanj-flugfoliojn. Scenej-prezente nia grupo ankaŭ distris.

**Programoj**
Lu 23.10: - Kursoj, legogrupo + La kvara prelego en la serio 'La origino de ĉio': Jens S. Larsen prelegos pri *La origino de la homo.* (La tria prelego okazis en Medborgerhuset la 11.10).
Lu 30.10: - Kursoj, legogrupo kaj studgrupoj.
Lu 06.11: - Kursoj, legogrupo + Kantvespero, dum kiu ni kantu konatajn kaj ne konatajn kantojn, krome ni ludos.
Lu 13.11: - Kursoj, legogrupo kaj studgrupoj.
Lu 20.11: - Kursoj, legogrupo + La sesa kaj lasta prelego en la serio 'La origino de ĉio': Jens S. Larsen prelegos pri *La origino de la lingvo.* (La kvina prelego okazis en Medborgerhuset la 08.11).
Lu 27.11: - Kursoj, legogrupo kaj studgrupoj.
Lu 04.12: - Kursoj, legogrupo + numerloterio.
Lu 11.12: - Jularanĝo, ne-tradicia: kantoj, ludoj, voĉlegado (kristnaska/solstica rakonto) muziko - Kim? Anstataŭ fromaĝo ni havu pecon da kuko. Dolĉaĵojn oni rajtas kunporti.

**Esperantoskolen.dk**,
Ny Kongensgade 21, 1., tv. sabataj posttagmezaj kunvenoj je h 15.00:
Sa 28.10: Se Kirsten-Tove venos, ŝi parolados al ni pri mejloŝtono de la evoluo de la vivanta estulo. - Ludoj per esperantaj ludiloj.
Sa 11.11: Traduko de turismaj informoj pri Kopenhago.
Sa 09.12: Julfesto, danlingva, kune kun la najbaroj – ankaŭ infanoj.
**Sa 13.01: Ek de 10-a horo** ĝis 18-a horo, inkluzive lunĉo, Peter Weide faros lingvajn ekzercojn kun ni.
Kotizo por partoprenanto: 100 kr

**Esperantoskolen.dk vidu sur paĝo 6**



## Klubo Esperantista de Helsingborgo

**Saluton!**
La aŭtuno jam alvenis kaj kelkaj el nia klubo partoprenis la feston en Malmö. La klubanoj de KEM bone scipovas aranĝi festojn kaj pro tio ni ne klopodas mem organizi iun tian.
Nia aktivado dum la aŭtuna semestro estos sufiĉe modesta; ni havos nian studrondon merkrede kaj klubkunvenon en la biblioteko sabate la 18-an de novembro je la 13.30-a horo. Krom tio ne okazos io, kio estas jam decidita. Niaj planoj pri prelegoj en la biblioteko ne estis akceptitaj de la plankomitato. Ni provos denove dum la printempa semestro. Ankaŭ komencanta kurso ne okazos ĉi-semestre, ĉar nur du interesatoj anoncis sin al ABF.

Kio do jam okazis? Meze de aŭgusto esperantista familio el Germanio vizitis nin dum kvin tagoj. Ili partoprenis nian klubkunvenon la 19.8 kaj vespere spertis svedan kankrofeston en Ättekulla. Vi povas vidi fotojn sur ilia hejmpaĝo www.esperanto.de/unterweser (se ili ne forprenis ilin). Dum la ”postfesto” sur nia balkono pluraj lingvoj estis (mis)uzataj.
La 16.9 ni ekskursis en Planteringen kaj babilis en la ĝardeno de Barbro. Bedaŭrinde ni ne havis vizitantojn de aliaj lokoj/kluboj. Mi provis dissendi nian broŝureton tra Interreto, sed la dosiero estas tro granda (pro miaj fotoj) kaj tio ne funkciis. Iam mi refaros ĝin.

La lastan semajnon en septembro mi estis en Poznano pro miaj studoj. Mi havis bonan tempon, sukcesis en la ekzamenoj kaj partoprenis en Arkones (ARtaj KONfrontoj en ESperanto) dum la semajnfino. La postan semajnfinon (7-8/10) mi estis en Karlskoga por la seminario de Sveda Esperanto-Instituto. Håkan kaj Sonja Lundberg rakontis pri inter alie la Nitobe-centro kaj la retejo lernu.net, kaj Radojica Petroviĉ prelegis pri Aktualaj tendencoj en pedagogio, instru- kaj lernteknologio kaj instrumetodiko de lingvoj, kaj pri Sukcesfaktoroj en esperanto-instruado. Ĉiuj prelegoj estis tre interesaj kaj valoraj. Krome ni diskutis pri diversaj aferoj kaj interŝanĝis spertojn kaj ideojn. Mi havas fortan senton ke la seminario donos rezultojn en la laboro de la Instituto kaj en la kunlaboro inter la esperanto-organizoj en Svedio.

Ĝis revido Ann-Louise **Vidu ankaŭ pago 6**


## Fornal en Kopenhago en junio

Jerzy Fornal ludis teatraĵon pri la Vivo de Wolfgang A. Mozart.

Lia edzino Zofia Banet Fornalova prelegis pri siaj esploroj pri niaj esperanto-pioniroj.



---



## La Esperanto klubo de Lund

**Al vi ĉiuj koran saluton el malsanulejo.**

Klaran bildon pri mia sanstato mi ne havas. Mi petas kapti la okazon danki ĉiujn kiuj vizitis min, skribis kaj telefonis.

La plej ofta raportanto de LEK al Ponto feliĉe trovis anstataŭantojn, kaj ankaŭ la klubaj renkontiĝoj estas prizorgataj.

Pri aranĝoj de LEK vidu la lokajn gazetojn kaj la hejmpaĝon de Sunda Agado.

**Kore salutas**
**Anna-Maria**

## Mia unua renkontiĝo kun esperanto grandskale.

Jam ĉe la pordo la atmosfero estis varma kaj agrabla ankaŭ por tia kiu mi – komencanto kaj laiko! Oferto de lekcio kaj de diversaj specoj kaj rilate pri diversaj temoj miris min. Mi partoprenis en kurso por novuloj, por kompreni kio okazas ĉirkaŭ mi. La homoj kun kiuj mi havis kontakton estis agrablaj kaj surprize ili komprenis min malgraŭ mi eraris. Ili klarigis angle!. Mi ricevis kelkajn novajn geamikojn en ”mia kurso”. Ofte ni bezonis kaj brakojn kaj krurojn por kompreni unu la aliajn. Sed malgraŭ tio estis bone scii ke ankaŭ aliaj ne parolas esperanton!




Kongreso estis nova sperto por mi. Mi konstatis ke esperanto fakte eksistas, vivas kaj ke eksistas homoj en la tuta mondo kio uzas ĝin. Kaj por ili estas grave veni de la tuta mondo por uzu ĝin. Eble ni renkontiĝos dum alia kongreso!
Gis la! Tomas Kwasniewski

**AKTUALA ESPERANTO-AGADO**
**EN LA SUNDA REGIONO**

| Kiam/När? | Kie/Var? | Kio/Vad? |
|---|---|---|
| 2006-10-11 | KEKG, Kopenhago | ”La origino de la vivo” Kiam kaj kiel okazis la transiro de ne-vivo al vivo? Rut Jesus asistate de Jens S. Larsen prelegos |
| 2006-10-14 Dimanĉe 16.00 h | KEM, Malmö | Aŭtuna festo - Asta Schaedel rakontos pri renkontoj kun esperantistoj en Japanio |
| 2006-10-21 | SEA, Helsingborg | Bonvenon al SEA-kunsido en Helsingborg. Vidu paĝo 1 en Ponto 3 |
| 2006-10-25 | KEM, Malmö | Ni ordigos la multajn klubajn fotojn, malnovajn kaj novajn. |
| 2006-10-28 | KEH, Helsingborg | Planata kunveno en la Biblioteko |
| 2006-11-08 | KEKG, Kph | ”La origino de kulturo kaj civilizo”. Prelegserio DEFA/ KEK |
| 2006-11-18 13.30 h | KEH, Helsingborg | Klubkunveno dum la au´tuno |
| 2006-11-19 Dimance kl.16.00 h | KEM, Malmö | Aŭkcio - Auktion. Tag med alla vänner och bekanta |
| 2006-11-08 | KEM, Malmö | Ordinara kunsido. Tagordo paĝo. 2<br>Unue ni planos la agadon dum la printempo. Pripensu! |
| 2006-11-16 | LEK, Lund | Kunveno |
| 2006-12-06 | KEM, Malmö | Kiel vi celebras la kristnaskajn feriotagojn? Rakontu!<br>Ni babilos, kafumos kaj manĝos luĉifestajn kringojn. |
| 2006-12-09. | KEKG, Kph | L.L. Zamenhof-festvespero - detala programo aperos |

**Rigardu www.agado.net por pli da programoj!**

# Informoj pri esperantokluboj kaj grupoj de SEA

**Klubo Esperantista de Malmö, K.E.M.**
La kunvenoj komenciĝas je la 18.30 h
en Kronetorpsgatan 94, 212 27 Malmö
Kontaktpersonoj: sten@agado.net
aŭ karin@agado.net
Karin Lindquist,
Sergels väg 14 A, 217 57 Malmö,
tel. 040-98 01 20

**La Esperanto Klubo de Lund, L.E.K.**
Niaj monataj kunvenoj okazos ĉiun duan jaŭdon en monatoj sept.-majo je la 18.30-a h. en la ejo de nia studorganizo SENSUS, Krafts torg 12 A.
Kontaktpersonoj: Anna-Maria Lange, Bredgatan 27, 222 21 Lund, tel. 046-147309
aŭ rete: Allan Ljungstedt, allan.ljungstedt@telia.com

**Klubo Esperantista de Helsingborg, K.E.H.**
La kunvenoj okazos je la 14-a horo en
Bonvolu informiĝi ĉe Ann-Louise Åkerlund tel. 042-291262 aŭ 042-186639 (oficejo) aŭ ĉe Barbro Haraldsson tel. 042-121471

*Retpaĝo de SEA*
*www.agado.net*

**Konversacia Esperantista Klubo Kopenhago, K.E.K.**
Kunvenas en la ejo de DEFA. Vidu la informojn tie. Prezidanto: Kim J. Henriksen, tel. 0045-32 54 93 54. Rete: kek@esperanto.dk

**Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo, KEKG**
Aranĝoj en Medborgerhuset,
Danasvej 30 B, atingebla per buslinio 29 el stacio Vesterport,salono n-ro 1,
dua etaĝo. Pordoj malfermitaj 19.00-23.00.
Ĉiu prelego okazos ĉ . 19.30 – 20.30.
Se vi deziras detalojn pri la prelegoj aŭ havas demandojn pri la aranĝoj bonvolu turni vin al Torben Svendsen, Vanløse Alle 57,
DK-2720 Vanløse. Tel. 0045-38 74 97 64
Persone al la kontaktulo de KEKG:
Torben Svendsen: esperanto@webspeed.dk
Al la asocio - KEKG: kulturgrupo@webspeed

**Fervojista klubo en Kopenhago, DEFA**
Kunvenas lundojn inter 19.30-22.00 en Banedanmark, entreprise, Vasbygade 10.
Por eniri: uzu la sonorilon ĉe la (krd)pordo.
Kontaktulo: Lene Niemann,
tel. 0045-49 26 13 19
Rete: niemann@kabelmail.dk

## Esperanto en lernejo

De majo Barbro Haraldsson havis la eblecon informi pri esperanto en la lernejo 'Kristerssons' en Helsingborg. La lernejo havis 'lingvan tagon'.

Kiam reprezentanto de la lernejo vokis kaj demandis, ĉu iu povas veni al la lernejo, ŝi eksciis ke estos 50 lernantoj - "kunmetitaj grupoj de ses, sep kaj ok". Ŝi preparis sin por lernantoj de la klasoj ses, sep kaj ok, sed montriĝis ke temis pri ses-, sep- kaj okjaruloj!

Ŝi do desegnis, parolis pri substantivoj kaj sufiksoj, kaj donis al ili kopiojn de la unua paĝo de *Liza kaj Paŭlo* kun sveda traduko. "Espereble en la vespero la infanoj instruis iliajn gepatrojn kaj gefratojn pri Esperanto, ĉar ili scias ion, kiu estas tute stranga por la aliaj familianoj. Eble ili ekbruligis fajreron …" estas la dezirpenso de Barbro.

**Fervojista klubo en Kopenhago, DEFA**
**Kalvebod Brygge 32.**
Aŭtoj uzu la ramplon,
piedirantoj uzu ŝtuparon „trappetårn 32".
Kunvenas lundojn 19.00 - 21.30.
Kursoj kaj legogrupo ekde 18.45. Programo: 19.30 - 20.15 + 20.45 - 21.30. Paŭzo kun ebleco aĉeti kafon/teon kaj bieron/akvon 20.15 - 20.45.
Kontaktulo: Lene Niemann, Hovedvagtsstræde 9 E, 1., 3000 Helsingør, tel 49 26 13 19
Retadreso niemann@kabelmail.dk
esperantoskolen.dk, Ny Kongensgade 21, 1.Tv 1557 København V.
Ofertoj pri intensivaj kursoj de tempo al tempo.
La sabataj posttagmezaj kunvenoj okazas ĉi ie.
Kontaktulo: Ole Blaust, Ny Kongensgade 18, 2. th., 1557 København V, tel 3333 9030 kaj 2193 9030Retadreso zita@esperantoskolen.dk